

Christian Winther,  
Postsonor'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ne reen vidas kun doloro  
mi al la floro-tempo nun;  
kaj ne bedaŭras mia koro,  
ke nun ne brilas jam la sun'.

Mi scias ja, ke proksimiĝas  
migrado mia al la fin',  
ke vintre nun la jar' finiĝas,  
ke l' tombo enhejmigos min.<sup>2</sup>

Sed tamen en la koro sentas  
mi varman ĝojon de somer',  
sonadon, kiu ne silentas,  
kaj fajron de la primaver'.

Pendigis mi nur mian liron  
por dormo, ĝin ne metis for;  
vekiĝas ĝi, se la sopiron  
por kanti sentas mia kor'.

*Traduko de la Dana poemo "Efterklang" de CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, \*1796 – †1876) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-02.*

MR-067-3a / Arg-236-469 (2004-05-14 09:56:45)

---

<sup>2</sup>aŭ: ke tombo enhejmigos min.